Dep. legal: BI-1007-8ª

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

NIA PONTO

Barrencalle Barrena, 7 - 1.º
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

2ª jaro Junio 1988 Numero 9 (3)

NIAJ KONGRESOJ '88





'88





G R U P A J N O V A Ĵ O J

BILBAO-a KONGRESO.- Post oficialigo de nia akcepto organizi la 49-an Hispanan Kongreson, tiu de la jaro 1989-a, niaj demarŝoj ĉe diversaj instancoj daŭrigis eĉ pli seriozė, se tio eblus, ol antaŭ tiu dato.

Jen kelkaj novaĵoj rilate tiun eventon:

- Restadejo: Niaj unuaj kontaktoj kun la respondeculoj de restadejo de la fama Universitato de Deŭsto estis plensukcesaj kaj ĝi jam estas je nia dispono. Tamen, du gravaj baroj hezitigas nin: nur estas individuaj ĉambroj kaj la prezoj ne estas malmultekostaj

- Programo: Jam estas ellaborita la 1-an provizoran programon, pri kiu ni informos dum la Valencia kongreso.

- Datoj: la Kongreson ni okazigos inter la 17ª (Lundo) kaj la 22ª (Sabato) de Julio 1.989ª.

- Aliĝkotizoj: Laŭ decido de la L.K.K., ili ne altiĝos, do restos samaj kiel tiuj de la Valencia Kongeso.


- Demarŝoj: Ni estas vizitintaj, ĝis nun, la Bilbao-an Urbodomon, la Kulturan Konsilantejon de la Vaska Estraro en Bilbao, Vaskan Estrarejon en Vitorio, Bilbao-an Komercan Ĉambron,... ĉiuj fruktodonaj vizitoj, malgraŭ ke ni ne atingis ĉiujn niajn petaĵojn.

Kaj memoru: Ĉiuĵaude, ekde la 7ª kaj duono, ni kunvenas en nia Grupejo por pritrakti ĉiujn aferojn kiuj iafoje rilatas la organizadon de la Kongreso. Ĉies helpo, ideoj, sugestoj kaj, precipe, emoj al kunlaborado, estas bonvenaj. Ne hezitu!. Ĉeestu niajn kunsidojn!. Estas laboro por ĉiuj!.

DU GERMANINOJ VIZITOS NIN.- La 29-an aŭ 30-an de Julio, du germaninoj (18 kaj 19 jaraĝaj) vizitos nian urbon. Ili kontaktis nian amikon Jesús M. García per "Pasporta Servo"; tamen, pro tio ke li ne estas certa ĉu hejmos tiujn tagojn, ĉia sugesto aŭ propono por gastigi ilin estos bonvena.

Do, se vi deziras somerumi en Bilbao kune kun du belaj knabinoj, telefonu al nia Grupejo (416.44.92) aŭ al la hejmo de la invitinto (4604580).





NEKROLOGO.- La pasintan 27-an de Majo forpasis en Bilbao la veterana membro de nia Asocio Sro. Jesús Rodríguez Astigarraga. Malgraŭ ke lasttempe li malofte ĉeestis nian Grupejon nek partoprenis niajn aranĝojn, li estis unu el la fondintoj de la Grupo Esperantista de Bilbao en ĝia moderna epoko. KE LI PACE RIPOZU!.



Nikolaj Rytjkov - elektitaj eroj

Elektitaj Eroj

Tiu ĉi kasedo prezentas inspiran, varian antologieton el originala kaj tradukita esperanta literaturo, kaj belan specimenaron de varia aktora arto.

Tie ĉi troviĝas sprito de Rossetti aŭ melankolio de Kurzens; tragiko aŭ verva insultado de Ŝekspiro; delikate ironia tenereco de Solĵenicin; kompleksa poezio de Auld, polurita simpleco de Kaloĉaja Ezopo ...

Marjorie Boulton

NIKOLAJ RYTJKOV

RAPORTO


GEOGRAFIA DISTRIBUO DE LA SKRIBMANIEROJ*

Se la diverseco de lingvoj povas ŝajni evidenta obstaklo por la komunikado, la diverseco de skribmanieroj reprezentas alian almenaŭ same gravan obstaklon. Aktuale la "latina" alfabeto ĝuas ampleksan superecon, paralelan al la divastiĝo de la anglosaksaj kaj romanidaj lingvoj. Ĝiaj progresoj estis konstantaj ekde la pasinta jarcento, malutile al la araba alfabeto same en Afriko (svahila, hausa) kiel en Azio (turka, indonezia), kaj anstataŭis la ĉinajn ideogramojn en la vjetnama kaj same faros en la ĉina mem. Inter la eŭropaj, la ĉefa konkuranto estis la "kirila" alfabeto, kreita por la slavoj kaj adoptita de preskaŭ ĉiuj lingvoj de Sovetunio[1], sed, ekster Sovetunio, nur de la bulgara, la makedona, kaj la serba. Konserviĝis kiel nacia skribmaniero kelkaj alfabetoj de la sama origino kiel la du antaŭaj: la "hebrea", la "amhara" de Etiopio, la "greka", la "georgia", kaj la "armena". Rilate la "araban" alfabeton aŭ "arabopersa", ĝia areo estas limigita, kaj rilatas strikte al la arabaj landoj kaj de persa kulturo: Irano, Afganio, kaj Pakistano. Ĝi ne povis plu daŭri, per la Islamo, nek en Afriko nek en Centra kaj Orienta Azio. Kontraŭe, tuta familio de skribmanieroj rezistis sufiĉe bone la invadon de la okcidenta kulturo kaj de la industria civilizacio: temas pri la skribmanieroj aperintaj el la "bramana" alfabeto de la sanskrita. En Hindio entute ok, la plej divastigita el ili estas la "nagaria", aŭ devenagara, aktuale uzata en la sanskrita, la hinda, la nepala, kaj la marata; sed ekzistas aliaj sep, malsamaj, kaj propaj de la ĉefaj lingvoj de la lando: la "bengala", la "orja", la "guĝarata", la "pangaba", la "kanara-telugua", la "tamila", kaj la "malaja". Kaj, ekster Hindio, aliaj skribmanieroj de la sama idaro serves por skribi la "sinhalan", la "tibetan", la "birman", la "tajan", la "ĥemeran", kaj la "laosan". Kaj fine, kvankam en Ekstrema Oriento la ideogramoj teorie havas ne longan estontecon en Ĉinio, la "korea" havas sian propan fonetikan skribmanieron ekde la 15a jarcento, kaj la "japana"

1) Krom la finna, la estona, la latva, kaj la litova, fidelaj al la latina alfabeto; la georgia kaj la armena, kiuj posedas siajn propajn; kaj la jida, kiu uzas la hebreajn literojn.

la sian ekde la 9a jarcento, ili kombinas tion kun la uzado de ideogramoj.

Fakte, ni povas diri ke la latina alfabeto regas sur la plimulto da eŭropaj landoj, en la tuta Ameriko, en nigra Afriko, kaj en Oceanio kaj sudorienta Azio (Indonezio, Filipinoj, Vjetnamio); dum la eŭrazia maso estas dividita ĉefe inter kirila, araba, hinda,kaj ĉina skribmanieroj. Oni devas observigi,ankaŭ, ke la penetrado de la grandaj internaciaj lingvoj skribitaj per latinaj literoj, kaj de ĉiuj kulturaj aŭ komercaj signoj kiuj al ili rilatas, garantias kreskantan disvastigon de la latinaj literojn, nun jam preskaŭ universale ĉeestantaj en la signalado, la ŝildoj, la propagando, kune kun la naciaj skribmanieroj.



angla — A = araba — I = indonezia kaj malesa — 20 milionoj de loĝantoj

franca — Ĉ = ĉina

hispana — G = germana — R = rusa

portugala — H = hinda kaj urde — S = svahila

FIGURO.

Monda loĝantaro laŭ "internaciaj lingvoj"

*) El la verko "GEOGRAFIO DE LA LINGVOJ" de Roland Breton.

73a UNIVERSALA KONGRESO DE DE ESPERANTO.

23 - 30 Julio 1988. Roterdamo. NEDERLANDO.

Celo

La Universala Kongreso estas internacia manifestacio de la Esperantistaro, organizita de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Ĝi celas fortigi la solidarecon inter la esperantistoj, progresigi la movadon kaj studi ĝiajn problemojn. (Kongresa Regularo, art. 1)




Nieuwe Binnenweg 176, Roterdama sidejo de UEA

"Ĉi-jare la UK okazos en Roterdamo la ĉefurbo de la Movado. Post kiam Universala Esperanto-Asocio transloĝigis tien el Britio en 1955, ĝi fariĝis ne nur administre sed psikologie la centro de Esperantujo. Kaj en 1988 UEA festas sian 80an datrevenon.

La 73a UK enhavos la kutiman varion. Ĉiuj tradiciaj eroj ĉeestos, inklizive erojn fakajn - Internacia Kongresa Universitato, Esperantologia Konferenco k.s., kulturajn - nacia kaj internacia vesperoj, teatraĵoj, koncertoj, filmoj - kaj movadajn.

Apud ili, la ekskursoj kaj aliaj aranĝoj ebligos al vi konatiĝi kun la fascina kongreslando."



La kongresejo estos la koncerthalo De Doelen ("La Ĉeloj"), vasta kaj moderne ekipita konstruaĵo en la centro de Roterdamo.

44-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
Z A G R E B O, J U G O S L A V I O
1988. 07. 15–22.



saluton !

Kroatia Esperanto-Ligo invitas la 44an IJK-n al Zagrebo. Landa Kongresa Komitato ĝin organizas. Zagrebo estas ne nur administre kaj ekonomie grava urbo, ĝi estas riĉe kultura centro. Tie ankaŭ la Esperanta tradicio estas varia kaj vigla, kaj vizitantoj sentas sin ĉiam bonvenaj provizore hejmiĝi.

La kongreso okazos en Zagreba Lerneja Centro, kiu amplekas 4 loĝdomojn kun entute 650 litoj en ĉefe 4-litaj ĉambroj. Estas je dispono ankaŭ plia loĝejo. La kongresejon konsistigas tuta aro da domoj, kun restoracio, teatro, kino-salono, sporthaloj, parko, sportaj ludejoj.

Temo de la Kongreso estas "Komunikado en la 21a jarcento". Estos surloke foira ekspozicio pri "Komunikrimedoj por la estonto", kaj teknikaj ekipaĵoj permesos praktikan funkciadon de la temlaboro. Oni aktive ekspluatos plej modernan komunikteknologion, kaj en tiu programo Esperanto estos uzata en i.a. interna televido, kongresa radio-stacio, ĉiutaga gazeto, redakto de libro dum la semajno, mini-poŝto, traduk-projekto, komputila lernejo. Kongresanoj kunlaboros en ankoraŭ aliaj sekcioj por krei artajn programojn kiel materialon por tiuj komunikrimedoj.

E

..... Zagreb estas sufiĉe konata Esperanto-centro. En ĝi nun aktivas 3 Esperanto-societoj (la unua Esperanto-societo estis fondita en 1908, do antaŭ 80 jaroj). Ĉirkaŭ 1500 zagrebanoj parolas Esperanton. En Zagrebo aktivas Internacia Kultura Servo, la sola profesia E-entrepreno en Jugoslavio kun pluraj plentempaj oficistoj. En Zagreb ĉiuaŭguste okazas Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) en kiu esperantlingve ludas la plej bonaj mondaj profesiaj pupteatroj. Jam 35 jarojn ĉiudimanĉe estas elsendata esperantlingva radio-elsendo kaj lastatempe aperas ĉiuĵaŭde nacilingva rubriko "Esperanto" en la plej legata jugoslava tagĵurnalo "Večernji list". Zagreb ĝis nun gastigis dekojn da diversaj internaciaj esperantistaj renkontiĝoj, simpozioj, kongresoj kaj festivaloj. Ni esperas ke ankaŭ vi sentos vin agrable kaj hejmece en nia urbo.

24a INTERNACIA INFANA KONGRESETO

23a - 30a de Julio 1988, Roterdamo.

La infana kongreseto okazas samtempe kun la UK. Aliĝas tiuj infanoj kies ĉiutaga lingvo estas Esperanto, kaj tiuj kiuj lernas paroli ĝin en la lernejo. Sufiĉa lingvoscio estas kondiĉo de partopreno, kaj aggrupo games de 6 ĝis 13 jaroj, kun eventualaj esceptoj en nur specialaj kazoj.

La kongresejo troviĝas en bela kaj komforta skolta centro en antaŭurbo de Roterdamo. Ĉion gvidos sperta teamo de instruistoj sub ĉefa prizorganto. Unu el la celoj estas eduki infanojn al internacia amikeco per komuna lingvo sen iuj ajn apartigoj rasaj, naciaj, religiaj aŭ aliaj.
Alia celo estas kuraĝigi familiojn kaj instruistoj instrui Esperanto al infanoj, kaj kuraĝigi la infanojn lerni ĝin. Ke la publiko konstatu la interkompreniĝon ĝuste de infanoj, estas plia intenco.



★★★★★★★★★

24a KONGRESO DE SENNACIA ASOCIO TUTMONDA (SAT)

6 - 13/ 08 / 1988 Campos do Jordão. Brazilio.

Unua-foje en la SAT-historio ĝia kongreso efektiviĝas en alia hemisfero, en la Tria Mondo. Dum sep tagoj okazos prelegojn, ekskursoj, seminariojn kaj artajn vesperojn. Kun ebleco plilongigi vian ĉeestadon en postkongresa vojaĝo tra Brazilio.
La kongresa temo estos: "Esperanto kaj SAT en la tria mondo". Jen kelkaj preleg-temoj: "Sennacieco kaj klaneco", "Manuskriptoj en la brazilia Kultur-Havo", "Homeopatio kaj la internaj fortoj de l´ homo", "Historio de Anarkismo en Brazilio", k.a.

★★★★★★

48-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO (Hispana Esperanto-Federacio)

Valencio, 14 - 18 Julio 1988

Kun la kutimaj kongresaj eroj: prelegoj, kunvenoj, oficialaj ekzamenoj, artaj vesperoj, ekskursoj kaj aliaj.

Libera Tribuno

"NE UZU POŜTMARKOJ DE LIA MOŜTO"

La titolo ne pretendas polemiki pri monarĥio aŭ respubliko, ne. Temas tute simple pri rekomendo afranki viajn korespondaĵojn per neordinaraj poŝtmarkoj (tiuj kiuj ne surhavas la buston de Juan Carlos la 1ª).

Probable estas sciite de vi ke inter la esperantistaro troviĝas sufiĉe multaj filatelistoj aŭ simplaj poŝtmarkokolektantoj. Nur el nia grupo mi povus mencii pli ol dek. Certe ne malmultaj esperantistoj ekinformiĝis aŭ ekinteresiĝis pri Esperanto pere de la poŝtmarkoj.

Se en via korespondado vi uzas la neordinarajn (vi pagos tute same por ili en poŝtoficejoj kaj tabakvendejoj), la ricevonto tre ŝatos ĝin, des pli se li mem kolektas; eĉ se li ne kolektas, preskaŭ ĉiam li konas kiu serĉas kaj dankus tiujn poŝtmarkojn. Kaj tiuj kvadrataj papiretoj povas preskaŭ certe starigi la demandon kiamaniere vi korespondas kaj estigi interesón pri Esperanto. Ĉiukaze ĉiam estas pli belaj, atentindaj kaj konservindaj la kovertoj kun specialaj poŝtmarkoj. Krome tiuj etaj stampitaj papiretoj havas monvaloron - aktuala bonstata uzita poŝtmarko facile vendeblas je almenaŭ 30% de ĝia kosto antaŭ la uzo - kaj UEA kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj volonte akceptas uzitajn poŝmarkojn kaj poŝte havigas al si iom da mono vendante ilin.




bela, ĉu ne?
Kaj ne pli kosta.

Por fini mi volas nur bedaŭri ke Hispanio ne eldonis poŝtmarkon okaze de la Jubilea Jaro malgraŭ niaj petoj, kaj ankaŭ danki kaj gratuli la socialistajn landojn kiuj eldonis ĝin: GDR, Pollando, Bulgario, Ĉinio, Kubo...

Santiago Martín

NIA LIBRO-SERVO



	P-toj
LERNOLIBROJ	
- Parolu E-on. (Jose F. Arroyo). 50 pĝ.	500
- Nuevo metodo de Esperanto (F. de Diego). 218 pĝ.	600
- La Tuta Esperanto (Henrik Seppik). 180 pĝ.	650
LEGOLIBROJ	
- Paŝoj al plena posedo (W. Auld). 235 pĝ.	725
- Amuzaj dialogoj en Esperanto (A. Lienhardt). 143 pĝ.	750
- Amuza legolibro en Esperanto (A. Lienhardt). 216 pĝ.	1.050
VORTAROJ	
- Diccionario Hisp-Esp/Esp-Hisp. (Lexicón Sopena). 284 pĝ.	500
- Vocabulario Español-Esperanto (E. Tudela). 528 pĝ.	400
- " " Esperanto-Español (" "). 175 pĝ.	700
- Praktika Bildvortaro de Esperanto (C. Clarke). 96pĝ.	675
- Plena Vortaro de Esperanto (kun Suplemento) -eldono 1980- (E. Grosjean - Maupin). 512 + 64 pĝ.	1.675
MOVADO	
- Analoj de la esperanta movado en Hispanujo (A. Marco Botella) (Unua volumo 1.887 - 1.953). pĝ 384	1.500
(Dua volumo 1.954 - 1.987) . 396 pĝ.	1.600
ROMANOJ - RAKONTOJ	
- La familio de Pascual Duarte (C. J. Cela). 168 pĝ.	650
- Astura bukedo (antologio). 144 pĝ.	650
- Viveroj (Castelao). 44 pĝ.	150
HISPANLINGVAJ INFORMLIBROJ	
- El Esperanto (Pierre Janton). 144 pĝ.	500
KASEDOJ (Sonbendoj)	
- Liza kaj Paŭlo (kasedo + libreto). -.sondramo en E-o-	800
- Elektitaj Eroj (Nikolaj Rytjkov).	900

kaj MEMORU: la grupejan bibliotekon - preskaŭ 1.000 ekz.- oni malfermas ĉiujn ĵaŭdojn ekde la 7a kaj duono. Kiel societano vi rajtas uzi ĝin kaj pruntepreni tiujn deponitajn librojn.

Sufiĉa lingvonivelo en iu ajn lingvo necesigas kaj postulas daŭran, senĉesan praktikadon aŭ almenaŭ legadon!

KRUCVORTARO



ĦORIZONTALE

①. La Bilbao-a estos la ....

Hispana kongreso (1ª Parto). ②. Ret., ege antikva; Ene de, apud. ③. Nederlanda aŭtosimbolo; Prepozicio; Sen vokaloj, pagilo. ④. Rusa imperiestro; Tiu ne. ⑤. Malfor; Ne unu, sed du samtempe. ⑥. Stoneg´; Duafoj´; Adjektiva finaĵo. ⑦. Adverbe, flareblaĵo. ⑧. Fama Esperanta revuo (2ª Parto).

VERTIKALE

①. Fama Esperanta revuo (1ª Parto). ②. Esperanta verkisto, kies antaŭnomo estas Johano; Konsonanto post ĵ. ③. Kolekt´; Konsonanto antaŭ S; Ligil´ de l kapo al´ trunko. ④. Ret., sovaĝa pork´; 1ª vokalo; Ret., fil´. ⑤. Kvincent; Ret., laŭregul´. ⑥. Adverbo; Ret., trapaŝebl´. ⑦. Rilata al Ĥemio; komenc´. ⑧. La Bilbao-a estos la .... Hispana Kongreso (2ª Parto); Substantiva finaĵo.

POR TIUJ DU UNUAJ PERSONOJ KIUJ SOLVOS LA ĈI-SUPRAN KRUCVORTARON ESTOS LA ĈI-SUBA DONACLIBRO.



Ramón de Campoamor (1817-1901), Leopoldo Alas «Clarín» (1852-1901), Armando Palacio Valdés (1853-1938), Ramón Pérez de Ayala (1880-1962), Angel González (1925-).

Nia antologio estas trarigardo al pli ol unu jarcento de kontribuo de la Astura regiono al la hispana literaturo.

Oni povas diri ke la komuna trajto de la menciitaj verkistoj estas, ke ili tre engaĝis sin en la spirito de sian epoko, de ĉi lastas jarcenta periodo dum kiu plenumiĝis laplej kolosa evoluo kaj progreso de la civilizacio. Tiu jarcento al kies progresa karàktero kontribuis ankaŭ la Internacia Lingvo, Esperanto, kies 100-jaran jubileon ni festas per la eldono de ĉi tiu volumo

GEOGRAFIA DISTRIBUO DE LA SKRIBMANIEROJ (APENDICO)

मानव मुक्तिदाता प्रभु येसु मसीह्
की पावन जयन्ती की दूसरी सहस्राब्दि वर्ष -
समारोह में कलीसिया और विश्व व्दारा योग्य
रीति से भाग लेने के लिए स्वत: को तैयार -
करने के उद्देश्य से १ जनवरी १९८६ के दिन

Hinda

Смазал дядя дудочку и только потом заиграл. Раздались чудесные звуки старой народной песни. Давнымдавно девушки пели её и за работой, и на гулянье.

Rusa

Ռատիոհաղորդումներու բովանդակութիւնը բազմազան է. լուրեր եւ ծիսական յայտագիրներ, մշակութային եւ կազմաւորական բնոյթ ունեցող, երաժշտութեան եւ այժմէականութեան վերաբերող յայտագիրներ, ինչպէս նաեւ վիճաբանական ելոյթներ,

Armena

تتضمن نشرتنا الاخبارية اليومية نشاطات قداسة البابا والاخبار الفاتيكانية والكنسية واهم التطورات على الساحة العالمية، بالاضافة الى حلقة يومية:

Araba

您家住在那儿
我家住在百万庄路
二十四号
欢迎您来
我住在北京饭店
您住在几层
我住在十二层
您住多少号房间
我住在1208号

Cina

படமி பிடித்துக் காடடுகின்றது, வாழ்-
வை நடதீதும் விதமி பற்றிக் கூறு
கின்றது நாயினு கிந்தினை, நேயர்கள்
கருத்தை அறிய உதவுகிறது அஞ்சல்
பெட்டி, மனிதபிறான நடவடிக்கை

Tamila

6 triêu tin hũu công giáo Viêt Nam, trong cũng nhu ngoài nuóc, đang hân hoan chuan bien co trong đai: 117 chân phuóc tu đao Viêt Nam sẽ đuoc Dúc Thánh Cha tôn phong hien hoat giáo hôi, găp DGH, giai đáp thac mac tôn giáo, giáo hôi trong tuan qua,...

Vjetnama

Ἐνορχήστρωση, Παραγωγή, Διασκευή
καί Ἐκτέλεση (γιά ὅλα τά ὄργανα)
Ἀπό τόν ΒΑΓΓΕΛΗ ΠΑΠΑΘΑΝΑΣΙΟΥ
•Σύνθεση: ΒΑΓΓΕΛΗΣ ΠΑΠΑΘΑΝΑΣΙΟΥ
•Χορωδία: Ἴντα Παράσχου - Σωτήρης
Ζαλίδης - Στάθης Ζαλίδης

Greka

本辭典は吾人が日常エスペラント文献を繙讀の際に屢出合する普通語は勿論可成專門學術上の語をも網羅した故常時懐中に忍ばせて隨時その用に供し類する語で多くの辭書で合成語の如く扱れてゐるものやその逆のものを

Japana

በር.ሊ.ጳ. የታወጀውን ዓመተ ማርያም መከንያት በማድረግ: በየቀዳሚ ስለ አመቤታችን ልዩ አስተምህሮ የምናቀርብ መሆናችንን አናስታውቃለን:: አደማጮቻችን በተለይ የሚጡትን ነገር ቢናር: ቢያመለክቱን ደስ ይለናል::

Etiopa